

Graveco de tuja lingva praktiko post E-kursoj



Estas granda laboro de instruistoj, kiuj sukcesas interesi iom da personoj kaj poste gvidi bazan E-kurson. Tamen grandega plimulto de tiuj kursoj neniam estas ligitaj al iu praktikado de la kursanoj en internacia E-aranĝo, kiel la nura natura ĉirkaŭaĵo por uzi E-on. El tiaj kursoj ege malofte iu vere esperantistiĝas, eĉ se tiu sufiĉe bone lernis E-on. Pro tio gravegus por gejunuloj, kiuj sukcesas finfari elementan kurson, iri al iu internacia junulara aranĝo. La plej bona nuntempe en Eŭropo estas SES (Somera E-Studado) en Slovakio, kiu ankaŭ ne multe kostas. La instruistoj devus stimuli la kursanojn iri post la kurso tien. Ofte ili timas solaj iri al iu tia aranĝo kaj la instruisto – se li/ŝi vere volas, ke lia/ŝia laboro ne estu vana – organizu tian vojaĝon tiel, ke kunvojaĝos kun la novlernantoj iu sperta esperantisto aŭ la instruisto mem.

Mi vidis, ke miaj gelernantoj en Maribor venadis tri jarojn al miaj kursoj pro mi (verŝajne miaj kursoj estis por ili amuzaj) sed ne fakte kaptiĝis de la Movado. Sed pasintjare unu el ili iris kun mi al SES kaj nun estas arda agantino kaj aktivulino. Tiu restado komplete ŝin ŝanĝis. Sen tia praktika apliko kaj konvinkigo, ke Esperanto vere portas novajn amikojn kaj komprenojn, ne eblas krei seriozajn movadanojn. Tial ĉiu kurso sen tio, ke post ĝi iu vere irus al internacia E-aranĝo, estas por la estonto de la Movado neefika maniero agi.

Zlatko TIŠLJAR (Slovenio) ztisljar@gmail.com